Universala Esperanto-Asocio



**RESUMO DE KOMUNIKOJ**

**Estrara Subteamo: MOVADO**

Estrara komuniko EKO 2015-2 sendita el Budapest la 29an de januaro

Al: Landaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne), Fakaj Asocioj, la Komitato, Konsilianoj, ILEI, TEJO, listoj kaj unuopuloj

Karaj,

Tra la plimulto de januaro mi silentis; tamen laboradis, nelaste por arigi, kompletigi kaj priskribi la komunikojn de nia subteamo al la Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj multaj aliaj. Decembre mi sendis la listigon de la unua jarduono; jen la plena listo, kun tiuj pri la ILEI-konferenco (6) kaj la 99a Universala Kongreso (8) apartaj.

**Alia novaĵo:** La naŭa seminario pri Aktivula Maturigo ĵus venis al fino en Rio de Ĵanejro. Tuj kiam mi ricevos raporton (kaj esperebIe fotojn) mi plusendos ilin al vi.

## Registro de komunikoj por Landaj Asocioj k.m.a. en 2014

Jen resuma tabelo de la komunikoj senditaj al Landaj Asocioj de la vicprezidanto de UEA, nome de la subteamo MOVADO, kiu respondecas pri rilatoj kun Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj similaj enmovadaj instancoj. La komunikoj ĉiam aperis simplatekste, ofte kun aldonita ilustrita PDF-versio aŭ alkroĉaĵoj. La kolumno 'PDF?' indikas, ĉu la originala komuniko havis alkroĉitan ilustritan PDF version; se jes, kiom paĝa. En kelkaj kazoj disiris nur simpla teksto, sed ni jarfine kreis PDF kun poste ricevitaj fotoj. Kie troveblas du ciferoj por la vortnombro: la pli alta temas pri la komuniko plus klarigoj, la dua pri nur la komunika teksto mem.

La cirkuleroj iris al la sekvaj grupoj kaj foje al pliaj unuopuloj kaj koncernatoj:

- Komitatanoj, konsilianoj kaj la Regionaj Komisionoj de UEA
- La estraranoj de TEJO; la estraro, komitato kaj sekciestroj de ILEI kaj ĝia retgrupo <e-ins>
- La retgrupo <uea-membroj>  (ĝis julio tiu grupo ne akceptis alkroĉaĵojn.)
- Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne-aliĝintaj)
- Gazetaroj kaj Radio-stacioj (nur ekde novembro 2014)

Resume disiris **52** komunikoj, sed klare ne laŭ ĉiusemajna ritmo. 28 el tiuj komunikoj disiris kun ilustrita PDF versio, aldone al la simpla teksto. 24 el la 52 (do iom malpli ol la duono) rilatis parte aŭ tute al la AMO-programo.

En la unua duonjaro disiris **15** komunikoj, el kiuj 9 parte aŭ tute pri la AMO-programo.

En la  dua  duonjaro disiris **37** komunikoj, el kiuj 15 parte aŭ tute pri la AMO-programo.

| Dato | PDF? | Temoj | Notoj |
|---|---|---|---|
| 2014-01-22 | 2p | AMO 1, AMO 4, etape, Poznano, cirkulera listo el 2013 | 6 bildoj en PDF-versio |
| 2014-02-07 | 3p | AMO 1 detala programo kaj temprezentoj | 2 bildoj en PDF-versio |
| 2014-03-07 | ne | AMO-1 sipendirezultoj, AMO-2, AMO-CN, AMO-IT. 1p. | Alkroĉita: Programo de AMO-CN |
| 2014-03 -20 | ne | Duona paĝo: AMO-1, ETAPO 14, Estrarkunsido de UEA | Vortoj: 240 vortoj |
| 2014-03-22 | ne | AMO-1 per du samtagaj komunikoj. | Du alkroĉaĵoj, nun aldonitaj. |
| 2014-03-24 | ne | AMO-1 – la tria komuniko – pri la radio intervjuo kaj forumo | Sen alkroĉaĵo |
| 2014-03 27 | ne | ILEI en Urugvajo – raporto de Radojica Petrović | Sendita el Roterdamo. |
| 2014-04-02 | 2p. | Estrarkunsido de UEA, neatendita AMO en IJK | PDF kun ses bildoj |
| 2014-04-14 | ne | Estrarkunsido de TEJO en Novara, Italio | Vortoj: 645. |
| 2014-04-26 | 2p. | UAM – Poznana kursaro. Pledo por kursanoj | PDF kun 2 fotoj, ligoj al filmetoj |
| 2014-05-10 | 2p | AMO-seminarioj 2, 3, 4 (CA, BR, CN). Gvidontoj, informoj. | Vortoj: 363. PDF kun 4 fotoj |
| 2014-06-01 | ne | UAM – Poznano – kondiĉoj por stipendioj. | Vortoj: 550 |
| 2014-06-08 | ne | Stipendioj por AMO-IT. Sendita el Erfurt | Vortoj: 330 |
| 2014-06-27 | ne | Vizito al Bulgario – kun libroj el HU. Bildoj postaldonitaj | Vortoj 254: (Beograd/Sofia) |
| 2014-06-29 | ne | Raporto pri Bulgario – sendita el Sofio. Bildo postaldonita. | Vortoj: 370 |

| **Fino de la unua jarduono (15), eko de la dua (37)** | | | |
|---|---|---|---|
| 2014-07-02 | 2p | Tria Tutmonda Kolokvo. Kun teksto de M. Grosjean. | Vortoj: 560 vortoj. Kun fotoj. |
| 2014-07-04 | 1p | 47a Konferenco de ILEI en Montevideo; kun fotoj | Vortoj: 190 |
| 2014-07-08 | 2p | FLAM-analizo el Buglario kun emblemo kaj grupfoto | Vortoj: 588 |
| 2014-07-14 | 3p | PDF kun tri grandaj fotoj. Teksto: MF. AMO 2. | Vortoj: 715 |
| 2014-07-16 | 2p | AMO-CN, SES, lasta alvoko por UAM en Poznano | Vortoj: 430 |

| **Konferencaj kaj Kongresaj Komunikoj (15)** | | | |
|---|---|---|---|
| 2014-07-21 | ne | Mia alparolo al la interna malfermo de ILEI (okazis la 20an) | Vortoj: 500; Fotoj I Lap aldonitaj. |
| 2014-07-21 | ne | ILEI-konf - solena inaŭguro de la 47a Konferenco | Vortoj: 825 |
| 2014-07-21 | ne | AMO-IJK kaj precizigo. Du alkroĉitaj bildoj de AMO-IJK | Vortoj: 360; bildoj nun aldonitaj |
| 2014-07-24 | 2p | ILEI-konf – foto albumo de parlamentejo; Olivera / Brito. | Vortoj: 80. Nur PDF. |
| 2014-07-25 | ne | ILEI-konf, simpozio, raporto MF, sendis SMG | Vortoj: 725 / 870 |
| 2014-07-25 | 3p | ILEI-konf, raporto M Grosjean kun foto-albumo 2 (14 fotoj) | Vortoj: 340 / 360 |
| 2-14-07-26 | 4p | ILEI-konf – fotoalbumo 3 MB, 18 fotoj – LF, Sem, balkono… | Vortoj:210. Sendita el pramo. |
| 2014-07-28 | ne | UK – kom1 – Inaŭguro, parto 1, nur teksto: 480/630 vortoj | PDF 2p. 4 fotoj postfarita Jan 2015 |
| 2014-07-28 | 3p | UK – kom2 – Inaŭguro, festparolo MF, PDF kun 3 fotoj | Vortoj: 1140 |
| 2014-07-29 | 1p | UK – kom3 – Inaŭguro, parto 2,kun 4 fotoj MB | Vortoj: 270 / 345. |
| 2014-07-31 | 11p. | UK – kom4 – Tago de Konsciigo, kun alkroĉita PDF (11p) | V: 230. PDF postfarita, ĉio kuna |
| 2014-07-31 | | UK – kom5 – Tago de Kapabigo – nur teksto kun alkroĉita PPT | Vortoj: 650 |
| 2014-08-01 | ne | UK – kom6 – Komitatkunsido vendrede; PDF postfarita. | Vortoj: 525 |
| 2014-08-03 | 2p | UK – kom7 – Fermo kaj Landaj Salutoj – PDF sen bildklarigoj. | Vortoj: 170. Fotoj: 9 |
| 2014-08-03 | ne | UK – kom8 – Ferma saluto de MF | Vortoj: 480 / 630 |

| **Daŭrigo de la komunikoj** | | | |
|---|---|---|---|
| 2014-08-12 | ne | AMO-CN, IT, UAM ekos, RO en Rascruci, Krynica | Vortoj: 545 |
| 2014-08-21 | 2p | PDF: Fotoj AMO 1-2-3-4 + alvoko, vortoj: 90. Ligo al AMO-CN | Vortoj: 347. AMO, UAM, ILEI-konf. |
| 2014-08-27 | 3p | AMO-IT lundo; Sara Spano, foto kaj diagramo | Vortoj: 1087 |
| 2014-08-28 | 1p | AMO-IT mardo, Amri W, foto de AW, ligoj por AMO-CN | Vortoj: 500 |
| 2014-08-29 | 2p | AMO-IT jhaudo, Giulio C, ĵurnalismo, Azanio, ald. Pdf GC. | Vortoj: 627 |
| 2014-09-04 | 4p | PL-Krynica, la forumo kun 3 grandaj fotoj (PB). | Voirtoj: 1455 |

| | | | |
|---|---|---|---|
| 2014-09-05 | ne | PL- Konferenco de Tria Aĝo, Nowy Sącz. Al limigita distribuo. | Vortoj 260 |
| 2014-09-19 | 4p | AMO 4, 6, 7, Tria aĝo, UK-filmoj, Amo 4 ligoj pri informado. | Vortoj: 787. PDF sen pliaj bildoj. |
| 2014-09-28 | ne | RO – nacia televida elsendo | Vortoj: 350 |
| 2014-11-06 | 4p | AMO 6 detala programo, 7-9 informoj. Ald. Teksto Adjevi | Vortoj: 955 |
| 2014-11-14 | ne | AMO-KAEST Konkrete kaj perrete. | Vortoj: 530. Sendita de Modra. |
| 2014-11-19 | 4p | AMO 6 Resumo de prelegoj, rekomendoj, 7 fotoj. | Vortoj: 1135 |
| 2014-12-10 | 2p | Supra enhavo, sen/kun AMO 8 gvidontoj kun 4 bildoj. | Vortoj 602 Ĝisdatigita dumsende. |
| 2014-12-15 | ne | Z-festoj Nyireghyhaza kaj Bp kun 100-vorta resumo. | Vortoj: 335 PDF postfarita. |
| 2014-12-23 | 2p | AMO 7 (2 antaŭfotoj) kaj 8 kaj resumo komunikoj jan-jul. | Vortoj: 330 sen la tabela teksto |
| 2014-12-29 | ne | AMO 7 – teksto ricevita. | Vortoj: 285 / 360 |
| 2014-12-31 | 3p | PDF: AMO 7 -3 fotoj kaj reprodukto de ATOP-komuniko. | Teksto AMO 7 kaj 8: vortoj: 439 |

Mi aldonas ZIP-dosierojn kun la komunikoj pri la 47a ILEI-konferenco kaj la 99a Universala Kongreso. Tiuj el januaro-julio (7MB) kaj aug-dec (6 MB) estas sendeblaj laŭpete. Ni laboradas, por ke la komunika kompleto estu videblaj ankaŭ en retejo.

Sekvos la LA kaj FA enketiloj.